

La Ondo de Esperanto

Internacia sendependa magazino en Esperanto. 2017. №6

En junio
komenciĝas
la Kongresa
Sezono en
Esperantujo.

Se vi ĉi-sezone
partoprenos
interesan
esperantistan
kongreson,
renkontiĝon
aŭ festivalon,
ne forgesu
sendi artikolon
(kaj fotojn!)
al *La Ondo*.

*Agrablan
Kongresan
Sezonon!*



Internacia sendependa magazino en Esperanto. 2017. №6 (272)

Ekde 2017 *La Ondo de Esperanto* aperas elektronike, kiel bitgazeto laŭ la normoj “pdf” kaj “ePub”.

Aperas ĉiumonate, krom aŭgusto. Senpaga literatura suplemento jarfine.

Fondita en 1909 de Aleksandr Saĥarov. Refondita en 1991.

Eldonas kaj administras: Halina Gorecka

Redaktas: Aleksander Korĵenkov

Konstantaj kunlaborantoj: Peter Baláž, István Ertl, Irina Gonĉarova, Dafydd ab Iago, Wolfgang Kirschstein, Aleksej Korĵenkov, Floréal Martorell, Valentin Melnikov, Paŭlo Moĵajev, Sergio Pokrovskij, Alexander Schlafer, Andrzej Sochacki

Poŝta adreso: RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205, Ruslando

Retpoŝtaj adresoj: sezonoj@kanet.ru, sezonoj@yahoo.com

Retejoj: <http://esperanto-ondo.ru>, <http://sezonoj.ru>

Perantoj. Vidu la liston sur p. 64-65.

Abontarifo por 2017

Internacia eŭra tarifo: 15 eŭroj

Internacia dolara tarifo: 17 usonaj dolaroj

Pollando: 60 zlotoj

Ruslando kaj Belarusio: 750 ruslandaj rubloj

Anonctarifo

Plena paĝo: 50 eŭroj (3000 rubloj)

Duona paĝo: 30 eŭroj (1800 rubloj)

Kvarona paĝo: 15 eŭroj (900 rubloj)

Okona paĝo: 10 eŭroj (600 rubloj)

Kovrilpaĝa anonco kostas duoble. Triona rabato pro ripeto.

Donacoj: La donacoj estas danke akceptataj ĉe la redakcia adreso (ruslandaj rubloj) aŭ ĉe nia UEA-konto «avko-u» ĉe UEA.

Recenzoj: Bonvolu sendi du ekzemplerojn de la recenzota libro, kasedo, disko k. a. al la redakcia adreso.

Represoj: Oni povas represi tekstojn kaj bildojn nur kun permeso de la redakcio aŭ de la aŭtoro kaj kun indiko de la fonto.

“La Ondo de Esperanto” (Волна эсперанто). 2017, №6 (272).

Ежемесячный журнал на языке эсперанто.

Журнал зарегистрирован Министерством Российской Федерации по делам печати, телерадиовещания и средств массовых коммуникаций. Свидетельство о регистрации ПИ №77-9723.

Учредитель и издатель: Горецкая Г. Р. Редактор: Корженков А. В.

Подписано в печать: 1 июня 2017 г.

© La Ondo de Esperanto, 2017.

Bazaj informoj pri <i>La Ondo de Esperanto</i>	2
En ĉi tiu numero	3

Temo 5

Clay Magalhães. Seulo atendas vin.....	6
--	---

Eventoj 9

Przemysław Wierzbowski. Landa kongreso en la naskiĝurbo de Zamenhof.....	10
Alina Mozer. Mi volas danki vin, sinjoro Ludoviko.....	12
Ela Karczewska. Konferenco: “Esperanto: Ideo – Lingvo – Iniciatinto”	14
Claude Nourmont. Maje estis gaje apud Parizo.....	17
Olivier Buisson. Printempa Migrado inter somero kaj vintro.....	18
La Estraro de UEA traktis renovigojn en Roterdamo	19
IKU kaj scienca programo en Seulo	20
Unesko-Kuriero, ĉu ankaŭ en Esperanto?.....	21
Estrara Raporto pri la agado de UEA en 2016.....	21
Richard Delamore. Amikumu progresas!	22
Edvige Ackermann. En la Alp-Adria regiono	23
Isikawa Tieko. Esperanto-Seminario: jubilea, sed pripensinda	25
Lu Wunsch-Rolshoven. Memore pri Zamenhof en Berlino.....	26
Vytautas Šilas. En Aukštadvaris seminariis ĵurnalistoj	27
Irena Tomaszewska. Ŝĉecina Esperanta Printempo.....	28
Aleksander Korĵenkov. Ĉu Esperanto reaperos sur la mapo de Kazano?.....	29
Anna Striganova. Esperanto-kurso en RUDN	30
Nekrologe	31
Koncize (10 informoj)	32

Tribuno 33

Komitatano Z. Katastrofe, sed... ĉu gravas?	34
Juncker konfirmas la rezignon pri la angla lingvo.....	35
Radio Esperanto: Nova sonprogramo en nova retejo	36
Mireille Grosjean. Unu leciono pri Esperanto por ĉiu lerneĵano.....	37
Irina Gonĉarova. Libro kaj lingvoj	38
Amri Wandel. Astrobiologio kaj la perspektivo de vivo ekstertera	39

Arkivo 47

Jubileoj kaj memordatoj en junio 2017	48
---	----

Kulturo	49
Grigorij Arosev. Konstantin Balmont: aŭskulti la printempon.....	50
Konstantin Balmont. Poemoj (Tradukis Nikolaj Nekrasov, Ludmila Novikova, Aleksander Korĵenkov)	53
Pascal Dubourg-Glatigny. Ekspozicio en Poznano diskrete omaĝas al Esperanto.....	56
Halina Gorecka. Vivis, vojaĝis, verkis (Recenzo: <i>Vivis, vojaĝis, verkis: Esearo omaĝe al Vasilij Eroŝenko, 1890-1952</i>)	57
Pri Zamenhof litove	58
Gazetoj ricevitaĵ en majo	58
 Mozaiko	 59
Nina Pietuchowska. La pola bigoso	60
Viktor Alikin. Krucenigmo "Tri dimensioj".....	61
Pri kiu temas?	62
Valentin Melnikov. Versportreto 9.....	62
Respondoj.....	62
Spritaj splitoj kaj preskeraroj	63
Kiel aboni <i>La Ondo</i>	64

Sur la kovropaĝo. Same kiel en la maja *Ondo*, ankaŭ en la junia la tri komencaj artikoloj en la primovada sekcio venas el Pollando, kie okazis pliaj esperantistaj aranĝoj omaĝe al la centa mortodatreveno de Zamenhof. La kovropaĝa foto, sendita de Irena Tomaszewska, montras la reklamon de Ŝĉecina Esperanta Prin-tempo, en kies programo ne mankis prelego pri "Nia Majstro".

Ni en la reto:

La Ondo de Esperanto: <http://esperanto-ondo.ru/Ind-ondo.htm>

Abono 2017: <http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Elŝuteblaj libroj: <http://esperanto-ondo.ru/Libroj/Libroj.php>

Novaĵretejo La Balta Ondo: <http://sezonoj.ru/>

Radio Esperanto: <http://radio.esperanto-ondo.ru/>

Halina en FB: <https://www.facebook.com/halina.gorecka.3>

Aleksander en LJ (ruse): <http://sezonoj.livejournal.com/>

Ruslingva informretejo: <http://rusa.esperanto-ondo.ru/>

Temo

Post malpli ol tri monatoj la ĉefurbo de Suda Koreio akceptos pli ol mil partoprenantojn de la 102a esperantista mondkongreso. Clay Magalhães, Konstanta Kongresa Sekretario de UEA, afable konsentis respondi kelkajn prikongresajn demandojn. Ni esperas, ke liaj respondoj estos utilaj al la kongresanoj.




Seulo atendas vin

En aprilo superis milon la nombro de la aliĝintoj al la 102a Universala Kongreso de Esperanto, kiu okazos la 22-29an de julio en Seulo. Ni petis al Clay Magalhães, Konstanta Kongresa Sekretario de UEA, komenti, ĉu tiu nombro estas kontentiga, kaj kiom da aliĝintoj fine allogos ĉi-jara kongreso.

Kiam UEA decidas pri la urbo, kie okazos la UK, kaj UEA kaj la invitanta organizo (kutime Landa Asocio) ĉiam havas la fidon, ke tiu kongreso (la urbo, lando, regiono) estos populara inter la esperantistoj, ĉefe al tiuj de la propra kaj najbaraj landoj. Ĉiam estas la espero, ke la kongreso havos amasan partoprenon. Tamen eksteraj faktoroj, kiujn la organizantoj ne povas antaŭvidi, povas kaŭzi ian malemon inter la publiko de la kongreso iri al tiu UK. La plej oftaj el tiuj faktoroj estas ekonomiaj krizoj, sed foje estas ankaŭ aliaj, ekzemple, streĉaj rilatoj inter iuj popoloj. Konsiderante tion, ke la UK okazos ekster Eŭropo, kie estas la plejmulto de la oftaj kongresanoj, kaj la nunan internacian situacion, mi povas diri, ke la nombro de la aliĝintoj al la 102a UK ne estas malbona, malgraŭ tio, ke ni voluntus almenaŭ duoble pli da partoprenantoj. Ĝi certe ne estas inter la plej malgrandaj Universalaj Kongresoj.

Prognozi en tiu ĉi momento la finan nombron de kongresanoj estas multe pli facile ol fari tion jarojn antaŭ la UK, sed eĉ tiel ni povas havi surprizon, kiu, en tiu ĉi kazo, espereble estos pozitiva. Mi pensas, ke facilos havi 1150 kongresanojn antaŭ la fino de la UK.



Kiu estas la jubilea aliĝinto №1000?

La kongresano kun numero 1000 estas la juna koreo s-ro Kim Jeongbin.

El kiuj landoj oni aliĝis plej amase?

La landoj kun plej multe da kongresanoj estas Koreio kun 228 partoprenantoj, Japanio kun 180 partoprenantoj, Ĉinio kun 126 partoprenantoj (el tiuj 15 el Tajvano kaj 3 el Honkongo), Francio kun 81, Germanio 36, Brazilo 35, Ruslando 31, Pollando 25, Nederlando 24, Usono 22 kaj Hispanio 21.

Post la 89a UK en Pekino en 2004, ĉi-jara UK estas la kongreso kun la plej granda nombro de la aliĝintoj el Ĉinio. Ni atendis iom pli da kongresanoj el Germanio, sed ne povas diri, kiu estas la kaŭzo de la ne tiom multnombra aliĝado el tiu lando.

Kiel kutime, la kongreson kunorganizas la surloka LKK kaj la Kongresa Fako de UEA. Ĉu la kunlaboro okazas senprobleme?

Jes, la laboro okazas glate. Estas LKK-anoj kiuj ĉiutage laboras por la UK, aliaj

sporade, laŭ la bezono. Kiel en ĉiuj LKK-oj, ja estis malkonsentoj kaj elreviĝoj, kiam iu ideo ne estis akceptita de la plejmulto aŭ ne povis esti efektivigita, sed eĉ tiuj homoj, kiuj prenis iom da distanco el la LKK-laboroj faras ion por la sukcesigo de la kongreso.

La pasint-jara UK en Nitro estis nekutime publika; okazis pluraj aranĝoj kun partopreno de neesperantistaj fakuloj, kaj la esperantistoj prezentiĝis al la lokanoj koncerte kaj procesie. Kiomgrade la Seula programo estos publika?

Estas ne juste kompari nekompareblajn urbojn. Des malpli en malsamaj mondo-partoj, kun malsamaj kulturoj kaj kutimoj kaj kun tiel enorma grandecdiferenco. Dum en Nitro ni estis la ĉefa internacia evento de la urbo en multaj jaroj (almenaŭ laŭ la nombro de eksterlandaj gastoj) kaj ricevis amason da subteno de la lokaj aŭtoritatoj, en Seulo ni estos unu plia internacia evento en la enorma metropolo. Ne eblos malfermi niajn koncertojn al nekongresanoj, ĉefe pro la manko de taŭga loko por tio, kunsiderante la prezon por tio kaj ankaŭ la temperaturon en Seulo en tiu semajno. Ni ja planas malfermi la Movadan Foiron kaj la futbalmatĉon al la ekstera publiko. Nepre menciindas ke estos Pontkunveno pri la Reunuiĝo de Koreioj en la (sud)korea parlamentejo, tio en si mem donos enorman videblon al nia kongreso, kaj ke en la universitato (kongresejo) daŭre estos studentoj, kiuj vidos Esperanton ĉiutage, same kiel la enloĝantoj kaj laborantoj de la kvartalo kie troviĝas la universitato, areo dense loĝata.

La ekskursi programo allogas multajn kongresanojn, sed eble ankoraŭ ne ĉiuj faris sian elekton. Ĉu vi povas informi, kiuj kongresaj ekskursoj ne plu mendeblas, kaj al kiuj oni ankoraŭ povas aliĝi?

En tiu ĉi momento estas du ekskursoj, kiuj certe ne okazos (la tuttagaj ekskursoj E5 kaj E6 en merkredo) kaj alia en kiu certe ne plu eblas ricevi pliajn lokojn (la postkongresa ekskurso P1). Pri la aliaj ekskursoj ni serĉas aŭ pli grandan buson, aŭ pliajn Esperanto-interpretistojn, ĉar en tiu ĉi momento praktike ĉiuj jam atingis la kapaciton. Ni konsilas al tiuj kongresanoj, kiuj ankoraŭ ne mendis ekskursojn kaj deziras tion fari, kontakti la Ekskursan Giĉeton en la unuaj tagoj de la kongreso.

Kion proponas la kultura-arta programo en la ĉefurbo de Koreio?

Krom la Nacia Vespero, kun ecoj de la loka kulturo, estos koncertoj de *Asorti*, *Espera Mondo*, *Kajto*, Lino kaj Maju, kaj Park Sosan, lukto-danco de Kamelia, filmo de Anti-cool, teatraĵo de Doma kaj ankaŭ la Azia Vespero.

Por novuloj (i.a. el Duolingo) kaj por esperantistoj el etaj urboj, kiuj malofte praktikas Esperanton en siaj loĝlokoj, estas malfacile sekvi la prelegojn kaj diskutojn en IKU, ĉu oni preparas por ili instruan programon aŭ prezentaĵojn en “facila lingvo”?

Dum la UK estos la kutima instruado de Esperanto por komencantoj kaj ankaŭ por mezniveluloj, kaj la junulara programo kun diversaj ludoj, per kio oni praktikas la lingvon. Mi rekomendus al la komencantoj spekti iom da IKU-prelegoj kaj ceteraj diskutoj, por ke ili inspiriĝu plibonigi sian lingvonivelon, por ke ili konvinkiĝu (se tio entute necesos) ke ja eblas flue paroli Esperanton.

Sekvas tute praktikaj demandoj, unue: kia vetero estas atendebla tiusezone en Koreio kaj kiujn vestojn oni nepre kunprenu?

La somero en Seulo povas esti sufiĉe sufoka, varma. Ni konsilas al la kongresanoj porti leĝerajn vestaĵojn, sunprotektilon kaj trinki amason da akvo.

Due, kio pri la eblo interkompreniĝi surloke en muzeoj, vendejoj, restoracioj? Probable, nur malmultaj nekoreaj kongresanoj scias legi kaj interparoli koree.

Laŭ mia persona sperto, la sola situacio en kiu mi ne povis interkompreniĝi kun iu en Koreio estis kun taksiistoj. Post longa provado ke li komprenu la adreson de la hotelo, skribita en la latina alfabeto, li vokis helpnumeron, en kiu iu interpretis inter ni (per tiu helpo li sukcesis trovi la lokon).

Amuza anekdoto okazis, kiam mi aĉetis frukton de surstrata maljuna vendisto proksime de la kongresejo: sub la frukto estis notita la prezo, tiel ke mi devis nur fingromontri la frukton kaj tuj donis la ĝustan sumon al li. Li donis la frukton, prenis la monon. Tiam li rigardis min per dolĉaj kaj demandemaj okuloj kaj demandis ion en la korea. Mi sentis ke la sola demando kiun li povintus fari en tiu situacio rilatis al mia fremda aspekto. Tiam mi diris: Brazil. Li ridetis kaj ripetis al la apuda vendisto la vorton kiun mi diris, ridetis al mi kaj mansvingis adiaŭante.

Kaj fine: kiujn koreajn frandaĵojn manĝajn kaj drinkajn vi rekomendus?

Tiu estas malfacila demando! Mi persone ŝatis ĉion, kion mi manĝis en Koreio, sed mi ne manĝis ĉiujn koreajn manĝojn. La personaj preferoj certe influas en tio, kion oni konsideras bongusta aŭ ne. Luj homoj “avertis” min, ke en Koreio la manĝoj estas tro spicitaj, sed mi ne trovis ke estis troigo en tiuj manĝoj, kiuj ja venis kun pipro. Kiam mi iras kun la lokanoj manĝi ie, mi tuj avertas pri tio, kiujn manĝaĵojn mi ne manĝas, kaj tio evitigas embarasojn ambaŭflanke (mi faras tiun averton en ĉiuj landoj, kien mi iras). Pozitive surprizis min la gusto de surstrata rizo-vafla. Pri trinkaĵoj, bongustaj estas la ginsengaj teoj.



Eventoj



Esperantistoj ĉe la palaco de Branicki (Bjalistoko) en 1927
(fotinto nekonata) kaj en 2017 (Foto: Nina Pietuchowska)



Landa kongreso en la naskiĝurbo de Zamenhof

La 12-14an de majo okazis la 36a Pola Esperanto-Kongreso. Ĉi-jare, por la unua fojo depost 1989, ĉi tiu kongreso okazis en Bjalistoko.

Vendrede post komuna manĝo en *Esperanto Cafe* la partoprenantoj renkontiĝis fronte de la palaco de Branicki. La celo estis fari foton similan al tiu el 1927, kiam la UK-postkongreso okazis en la naskiĝurbo de Zamenhof. La malfermo kaj plejparto de la kongresaj eventoj okazis en Centro Ludoviko Zamenhof, funkcia nun kadre de la Bjalistoka Kulturcentro. Tradicie la kongreson komencas kantado de *La espero*, sed ĉi-foje nia muzikisto Lech Mazurek proponis kanti ĝin laŭ nova, nemarŝa melodio, komponita de li por la poemo de Zamenhof. Tiun kaj aliajn kantojn prezentis lia plenkreska bando *Frey-Lech Trio* kaj la infana muzikensemblo *Uku-Donaco Bjalistoko*. La vicurbestro Rafał Rudnicki salutis la partoprenantojn nome de la urbaj instancoj, la direktorino de la kulturcentro Grażyna Dworakowska promesis pluan kunlaboradon kun la Esperanto-movado, nome de Pola kaj Litova Esperanto-Asocioj parolis ties prezidantoj, dankante al Bjalistoka Esperanto-Societo surlokan organizadon de la renkontiĝo.

La ceteron de la posttagmezo plenigis prezentado de *Zamenhof en Varsovio* de Roman Dobrzyński, paroladoj pri la hungara lingvo (Szabolcs Szilva), ZEOj (Robert Kamiński), Esperanto en bibliotekoj (Johann Pachter), vivo en pola vilaĝo (Shinziro Yamato) kaj interlingvistikaj studoj (Ilona Koutny). Fine, omaĝe al la forpasinta samideano Zbigniew Galor, kantis lia samurbanino Zuzanna Kornicka. Por la vespero oni transiris al la kafejo *Fama*, kie la kongresanoj ne nur aŭskultis koncerton de tradiciaj varsoviaj urb-kanzonoj fare de Varsovia Sentimentala Orkestro, sed ankaŭ dancis ĝis malfruo. Tiutage estis ankaŭ programero por neesperantistoj: Iwona Zalewska kaj Amelie Chartier, niaj junaj instruistinoj, proponis mallongajn lecionojn de la internacia lingvo.

Sabate antaŭtagmeze, paralele al ĝenerala asembleo de PEA, estis promenado tra Bjalistoko laŭ la itinero de Zamenhof kaj Esperanto. Bele reĝisorita: tra la urbo de sia infanaĝo akompanis nin Ludoviko Zamenhof (konvene vestita ĉiĉerono el Pola Turisma Societo en Bjalistoko), ĉe la iama bazara placo ni renkontis marĉand-antaĵojn en siaj lingvoj bazaristinojn, vendantaĵojn fiŝojn kaj panojn, kaj fine estis konkurseto pri la scio pri tiutempa Bjalistoko.

Ĝi estas demonstra versio de la 66-paĝa junia *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono por 2017 kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Amikumu progresas!

La 22an de aprilo estis lanĉita la apo (poŝtelefona aplikaĵo) Amikumu, kiu helpas trovi kaj kontakti proksimajn esperantistojn. Ĝi montras al la uzanto la cent plej proksimajn esperantistojn. Ni petis al Richard Delamore, la ĉefa afergvida oficisto de Amikumu, diri la unuajn rezultojn:

Dum la unuaj kvardek tagoj nian apon ekuzis 4103 personoj el 108 landoj. La landoj kaj urboj kun plej multaj amikumanoj estas:

Usono	634	San-Paŭlo (Brazilo)	56
Brazilo	369	Seulo (Sud-Koreio)	37
Germanio	262	Berlino (Germanio)	33
Francio	255	Pekino (Ĉinio)	33
Ĉinio	241	Londono (Britio)	29
Hispanio	194	Rio-de-Ĵaneiro (Brazilo)	27
Britio	173	Barcelono (Hispanio)	23
Ruslando	124	Madrido (Hispanio)	22
Italio	102	Parizo (Francio)	20
Sud-Koreio	91	Sidnejo (Aŭstralio)	20
Pollando	90	Varsovio (Pollando)	20

Kiujn reagojn vi ricevas?

Ĉiutage pluraj esperantistoj rakontas en sociaj retoj pri siaj sukcesaj renkontiĝoj kaj kunvenoj danke al Amikumu. Oni volas pli da funkcioj kaj lingvoj!

Ĉu aperis neantaŭviditaj problemoj?

Jes, ni havas multajn. Ekzemple, la rapideco de Amikumu en Ĉinio estas aĉega pro la fama ĉina fajromuro. Aliaj problemoj rilatas al internaj aferoj. Pro tio, ke la teamo troviĝas en diversaj landoj estas jure malfacile registri la firmaon. Ankaŭ preskaŭ ĉiuj el niaj juraj kaj financaj aferoj estas en Esperanto. Tio kaŭzis problemojn kiam mi devas labori kun la advokatoj.



Ĝi estas demonstra versio de la 66-paĝa junia *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono por 2017 kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>



Post la ekzameno kun Valentin Melnikov

Esperanto-kurso en RUDN

La 29an de aprilo sukcese finiĝis 16-hora kurso de Esperanto en Rusia universitato de amikeco inter la popoloj (RUDN) en Moskvo. Kvin lernantoj sukcese plenumis la ekzamenon kaj ricevis oficialajn diplomojn de la universitato. Ĉi tiu kurso donas konojn, kiuj sufiĉas por plua memstara lernado de Esperanto aŭ por daŭrigo kadre de plilongaj kursoj.

Esperanto estas instruata en RUDN ekde aŭtuno 2014, kiam okazis senpaga 10-hora "fulmkurso". Poste Dmitrij Ŝevĉenko kaj Anna Striganova ellaboris kaj lanĉis tri studprogramojn, kiuj nun sukcese funkcias: "Esperanto-kurso por komencantoj" (16-hora), "Baza kurso de Esperanto" (100-hora, por homoj, kiuj havas universitatan diplomon), "Elementa kurso de Esperanto" (100-hora, por lernejoj kaj homoj, kiuj ne havas universitatan diplomon). Por aŭtuno 2017 estas planata lanĉo de distanca-koresponda kurso.

Ĝi estas demonstra versio de la 66-paĝa junia *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono por 2017 kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Malgraŭ grandaj labordevoj, la Eŭrop-komisionano Vytenis Andriukaitis akceptis la inviton de la estraro de EEU veni al la konferenco de EEU, organizota je Pentekosto kune kun la Germana E-Kongreso en Freiburg. (Eŭropa Bulteno)

E-Radikala Asocio ricevis konsultan statuson ĉe la ECOSOC (Socia k Ekonomia Konsilio de UN); ĉi tiun statuson ĝis nun (de 1998) havis nur UEA. (HeKo)

La 24an de aprilo en la urbodomo de Słupsk sub patronado de urbestro de Słupsk d-ro Robert Biedroń k starosto (distriktestro) de Słupsk Zdzisław Kołodziejski okaze de la Zamenhofa Jaro 2017 okazis konferenco, organizita de EDE-Pollando k Studenta Scienca Rondo de Historiistoj en Pomeria Akademio en Słupsk. (Eŭropa Bulteno)

En la unuamajaj ferioj en la stadiono de la Xinxiang-a Aviada Industria Grupo okazis la premiera prezentado de arta E-trupo (konsistanta el tri artaj teamoj) de la Xinxiang-a E-Asocio, kies prezidanto Liu Jiahe estras ankaŭ la artan trupon. (El Popola Ĉinio)

La asista redaktoro de *Literatura Foiro* Perla Martinelli partoprenis kun oficiala akreditivo en la futurologia filmfestivalo okazinta komence de majo en Bolonjo, Italio. (HeKo)

De la 14a ĝis la 28a de aprilo en la Nacia biblioteko de Udmurta Respubliko en Ĵjevsk (Ruslando) funkciis ekspozicio «Doktoro Esperanto». (Bronislav Ĉupin)

La 9an de majo, kadre de la televida rubriko “Rai Parlamento”, la Itala Ŝtata televido elsendis dek-minutan intervjuon kun Carlotta Pavese (vicprezidanto de Itala E-Junularo), Paola Nigrelli (vicprezidanto de la Torina E-Centro) k Michela Lipari (Prezidanto de Itala E-Federacio); dum la intervjuo ankaŭ montriĝas eroj de la ĵusa Internacia Junulara Festivalo. (TEJO-Aktuale)

La infana raso / La specie bambina, dulingva eldono de la ĉefverko de William Auld per la italigo de Nicolino Rossi, debutis la 20an de majo en la librosalono en Torino, la plej grava librofoiro en Italio; la verkon prezentis la prefacinto Nicola Ruggiero k la eldonistino Neria De Giovanni. (HeKo)

La Estraro de UEA nomumis la novan konsiston de la Afrika Komisiono de UEA: s-ino Adeline Tony Umutoni el Ruando, s-ro Adjévi Adjé el Togolando, s-ino Alexandrine Omba Tshamena el Dem. Resp. Kongo, s-ro Alfred Arthur el Ganao, s-ro Arlain Kizeyidioko el Dem. Resp. Kongo, s-ro Assane Faye el Senegalo, s-ro Doumegnon Koffi el Togolando, s-ro Emile Malanda el Sud-Afriko (kunordiganto), s-ro François Hounsounou el Benino k s-ro Hassano Ntahonsigaye el Burundo. (GK UEA)

La 74a Internacia Junulara Kongreso de TEJO (IJK) okazos la 4-11an de aŭgusto 2018 en Badajoz, la plej granda urbo en la regiono Ekstremaduro, Hispanio. (tejo.org)

ווגל: "אנחנו כנראה נמצא כוכב עם חיים ביולוגים פשוטים במרחק של כ- 10 שנות אור, אבל חיים תבוניים, אם קיימים, נמצאים במרחק אלפי שנות אור מאיתנו, כלומר מחוץ לסווח היגלי שלם כיום"

אינו

יש הרבה שטראח את השם של תלמידי קורס זה של ביוספרה מדעית בוגר, הן כן אולי שצריך לא עז אם קי שיש ל השכנה את זה, יבחרו הכבוד מאותו שותף זה יש סוכר ל הנסנים שדווקא הם בולם של כחור ומיקרו, ו פה אנחנו חזק מצביעו חזק שידעו אקסטריות - א תרמויות ומספר רות בסוכרים זה מריום פשוט לא עשירי שגילה את, הדור, אנחנו חוספיות שבה כי חוספיות הראשון חוספיות הראשון האחד, המדעית שו בדת עם העצו חסות נבונה וברו לגבי חיים פשוטים מאד גדולים, אנו ביולוגים פשוטים אכל חיים פשוטים אלפי שנות אור ו העליון שלנו כיום כנראה הוא הרבה אלפי תרמויות

המרחץ של פאוק המס

המרחץ של פאוק המס

על אסטרוביולוגיה ווגל חזק מספר חתול, חתול חזק מספר עט מצגנים ולא חתול כחור שזה חתול, אכל שירות הערבות

המרחץ של פאוק המס

שמועתי, מורה 4.5 מיליארד דאם שבה לפני 4 שנה חזרתי מים אבל נישלגנים קיימים זה נאח אלה שנה כלומר, 3.5 מיליארד שנה 0.5 מיליארד שנה חיים אנחנו מונים בסוף 0.5 מיליארד חיים הראשונים ה א"י

בספרים הזה ווגל לשחק פשוט וזה באוניברסיטה הצרפתית וזה זה האשיות חיים בספרים בסוכר הזה ת מסל מסלם בעקבות כך, השנים אמר שיש חיים בעולם המדעי ובני זה שיתפל חתול הראשון בנשיא כנס לפני כמה חודשים, בספרואר ישנה, חזק של נאסא עזרת שיש שיש זה בדי חתול חוספיות הכחור האדור ובני

Astrobiologiaj esploroj de Amri Wandel pri ekstertera vivo ĉiam pli ofte aperas en diverslandaj amaskomunikiloj. Post lia furora debuto en la Ruslanda televido ni invitis lin verki en Esperanto resumon de siaj studoj por “La Ondo” (p. 39-46).

Katastrofe, sed... ĉu gravas?



Post la hontinda periodo, dum kiu la revuo *Esperanto* ege malfruadis, ĝia ĉi-jara aprila numero aperis ĝustatempe, per kio la nova redakcia paro el Moskvo tuj rikoltis pluspoentojn ĉe la legantoj sed samtempe grandajn atendojn, pri kies plenumo eblos juĝi nur iam poste. La sama numero tamen dokumentis ankaŭ la plej negativan sciigon, kiu lastatempe venis de UEA, nome la kolapso de ĝia membraro per la ŝoka kvanto de 1146 individuaj membroj en unu jaro. Se UEA ne havus preskaŭ mil dumvivajn kaj honorajn membrojn, kun tia ritmo nenio plu restus el ĝi post kvar jaroj.

La plej mirinda afero ĉirkaŭ ĉio ĉi estas, ke la falego apenaŭ vekis diskuton en UEA, kvankam ĝi estus povinta profiti de la longperspektiva analizo de Lu Wunsch-Rolshoven en la aprila numero de nia revuo, eĉ se ni malakceptas lian tezon pri la neevitebleco de la daŭra membrofalo. Pasintjare temis pri kraŝo, kiu en iu alia movado katalizus ŝtormon kaj postulojn ŝanĝi la gvidantaron. La estraro de UEA kvitancis la aferon per ŝultrolevo, menciante kiel la kaŭzojn de la malkresko nur la malgrandan UK (1253 aliĝoj kompare kun 2698 en 2015) kaj malpli da membrigoj per Fondaĵo Canuto. Al tiu dua faktoro ŝuldiĝas falo de 364, ĉar tiom ŝrumpis la nombro de tiuj, kies kotizon la fondaĵo donacas. Ni do povas kalkuli, ke la nombro de tiuj, kiuj mem pagis, malkreskis per 782. Tion ne klarigas nur la malpli granda UK, ĉar en la jaro de la granda UK en Lillo en 2015 la membraro kreskis nur per 474 kompare kun 2014, kiam la UK en Bonaero altiris nur 706 aliĝintojn. En la jaro de Bonaero UEA havis 5025 individuajn membrojn. Oni do supozus, ke devis esti facile atingi almenaŭ tiom ankaŭ pasintjare, kiam al Nitro aliĝis preskaŭ duoble tiom da homoj. La membraro en 2016 tamen restis 662 sub tiu en 2014. Ankaŭ sen konsideri la Canuto-anojn la falo estis granda, ĉ. 300.

Enigma cetere estas la situacio pri tiu Fondaĵo Canuto. Komence de la klarigoj pri la statistiko oni legas en la revuo pri "la daŭra transiro al nova politiko rilate al Fondaĵo Canuto" kiel faktoro de la malkresko, sed fine de la sama alineo oni ŝajnas

En nia nova rubriko "Vidpunkto" pri la nuna stato kaj estonteco de Esperanto parolas konataj aktivuloj, kies opinioj ne estas tute identaj kun la ideoj de la nunaj gvidantoj de la Esperanto-movado kaj kun la tezoj de la Strategia Plano de UEA. Reagoj estas bonvenaj.

komprenigi, ke la fondaĵo ne havis sufiĉe da rimedoj por same multaj membrigoj kiel antaŭe. Tiel malkoheraj klarigoj verŝajne vekas demandojn almenaŭ ĉe tiuj nepagipovaj aktivuloj, kiuj ial estis flankenmetitaj pasintjare.

Evidente la veraj kaŭzoj de la membrara kolapso estas aliaj ol tiuj, kiujn oni oficiale prezentas, sed almenaŭ la komitato de UEA devus interesiĝi pri ili. Ĉerte ni vivas en periodo, en kiu la objektivaj kondiĉoj por la membrovarbado estas malfavoraj. La socia prestiĝo de Esperanto estas mapli alta ol en la pasinteco, kiam multis sciencistoj, politikistoj kaj aliaj sociaj-kulturaj agantoj, kiuj eĉ mem estis esperantistoj kaj ne nur laŭmende diris ion belan pri ĝi. Malplimultiĝis la nombro de tiuj, kiuj rilatas al Esperanto serioze kaj ne nur por momenta amuzo. La vivuado pro la amasa lernado per Duolingo ŝajnas memtrompo, ĉar alie ankaŭ la en si mem laŭdinda telefona aplikaĵo Amikumu devus havi multe pli da uzantoj, sed ĝi apenaŭ atingis la nombron de UEA-membroj.

Malpli favoraj objektivaj kondiĉoj tamen ronĝas la statistikon de UEA iom post iom kaj ne subite kiel pasintjare. Dum longa tempo 6000 estis la magia limo, super kiu ŝvebis la membronombro de UEA, sed en tiu ĉi jarmilo oni estis feliĉaj, se ĝi restis super 5000. Ke pasintjare oni subite proksimiĝis al 4000, ne povos ne esti temo en la debatoj de la komitato en Seulo. Se tie kunsidus la supera organo de normala firmao, ĝi eksigus la plenuman organon, sub kiu oni venis al tiel katastrofa rezulto. Eĉ pli: en la normala mondo la plenuma organo mem demisius.

Komitatano Z

Juncker konfirmas la rezignon pri la angla lingvo

“Mi ĉiam dubas, ĉu paroli la anglan aŭ la francan, sed mi faris mian elekton. Mi prezentos mian paroladon en la franca, ĉar malrapide sed konstante la angla perdas sian gravecon”.

La prezidanto de la Eŭropa Komisiono, Jean-Claude Juncker, komencis tiel sian intervenon pri la stato de la Unio, la 5an de majo 2017 ĉe la Eŭropa Universitata Instituto en Florenco. La elekton pri la franca li motivis ankaŭ per la fakto ke en Francio okazas la baloto por la prezidento de la respubliko. Dufoje ĉe tiu enkonduketo la publiko vigle kaj sincere aplaudis.

“Ni intertraktados en absoluta lojaleco kun niaj britaj amikoj, tamen ne la Unio forlasas Brition, sed Britio forlasas la Union: en tio situas la diferenco, kaj tiu diferenco sentiĝos dum la venontaj jaroj”, – deklaris Juncker.

Liaj enkondukaj vortoj konformas al la prognozo, ke la angla ne estos plu oficiala lingvo de EU ekde 2020.



HeKo

Radio Esperanto: Nova sonprogramo en nova retejo

La 21an de majo aperis en la reto la tria ĉi-jara kaj la 43a laŭvice sonprogramo de *Radio Esperanto*. Ĝi komencas novan periodon de ĉi tiu podkasta serio, ĉar ĝi estas la unua programo publikigita en nova retejo. Bona okazo por retrorigardi.

Nia unua sonprogramo estis registrita kaj enretigita la 5an de februaro 2008. Ĝi estis konceptita kiel sonservo de *La Ondo de Esperanto*, sed post du monatoj ĝi ricevis la nomon *Radio Esperanto*: unue, ĉar nur du-tri tekstoj el ĉiu nova *Ondo* estis prezentataj ĉiufoje; due, en ĝi aperis kantoj kaj aliaj programeroj ne ligitaj kun nia gazeto. Iom post iom formiĝis la program-skemo:

1. Enkonduko de Aleksander Korĵenkov
2. “Okcidente de Ruslando”: Kaliningrada felietono de Halina Gorecka
3. Esperanto-novaĵoj
4. Prezento de *La Ondo de Esperanto*
5. Literatura aŭ alitema programero
6. Kanzono en Esperanto

La programojn kunkompilas kaj kungvidas Halina Gorecka kaj Aleksander Korĵenkov en Kaliningrado (en 2011 tri programoj estis faritaj en Moskvo). De tempo al tempo en la programoj partoprenas aliaj personoj, ekzemple, en la plej nova, 43a programo krom la du kungvidantoj gastparolas Aleksej Korĵenkov kaj Paŭlo Moĵajevo.

En 2008 aperis 18 programoj, sed en 2009 – nur unu, ĉar la nova redakcia komputilo (kiu funkcias ĝis nun kaj ne plu estas *nova*) estis ne nur pli potenca ol la antaŭa, sed ankaŭ pli brua, kaj tiu bruo ĝenis la registradon. En 2010, danke al aĉeto de tekokomputilo iĝis eble daŭrigi la registradon, sed poste la aperritmo eklamis pro sanproblemoj kaj pro elekto de aliaj laborprioritatoj. Ekde junio 2013 *Radio Esperanto* dum pli ol du jaroj silentis kaj reaperis nur en aŭgusto 2015.

La unuaj 31 programoj estis aŭskulteblaj, elŝuteblaj kaj aboneblaj ĉe la unua Ruslanda podkastejo Rpod. Sed fine de 2014 Rpod estis fermita, kaj ni ekuzis la podkastejon PodFM. Ĝi montriĝis neoportuna, kaj en majo 2017 la Kaliningrada Esperanto-Podkasto finfine ekhavis sian propran retejon, en kiu iom post iom reaperos ĉiuj ĝisnunaj eroj.

<http://radio.esperanto-ondo.ru/>

La posedantoj de iTunes kaj de aliaj programoj, kiuj ebligas aŭskulti kaj aboni podkastojn, povas aboni al *Radio Esperanto* ĉe:

<http://feeds.feedburner.com/esperanto-ondo/abonu>

La programgvidantoj de *Radio Esperanto* esperas fari ĝin ĉiumonata.

Bonan aŭskultadon!



Halina kaj Aleksander

Astrobiologio kaj la perspektivo de vivo ekstertera

de Amri Wandel

1. Enkonduko

La relative nova scienco astrobiologio, kiu esploras la eblecojn por evoluo de vivo en la spaco, ekevoluis en la 1990aj jaroj, kiam oni malkovris la unuajn eksterplanedojn (planedoj en aliaj, foraj sunsistemoj) kaj la Marsan meteoriton kun ebla fosilio de ĉelo. Intertempe, post pluraj esplormisioj, astronomoj kaj astrobiologoj malpli optimismas pri vivo en nia propra sunsistemo, kaj pli pri vivo en foraj eksterplanedoj.

La demando ĉu ekzistas vivo – aŭ eble eĉ civilizacioj – ie en la spaco, estas malnova, sed en la moderna epoko la scienco iom post iom havigas al ĝi respondojn malpli fantaziajn kaj pli bazitajn sur sciencaj esploroj kaj faktoj. En la lastaj jaroj aperis novaj esploroj, kiuj povas plibonigi la ŝancojn trovi vivon eksterteran. En nia sunsistemo estis trovitaj signoj de likva akvo sur la planedo Marso. En aliaj sunsistemoj verŝajne troviĝas planedoj kun vivo (almenaŭ primitiva) eĉ ĉe relative proksimaj steloj, je distanco de nur dekoj da lumjaroj. La ekscita konkludo estas, ke troviĝas probable milionoj ĝis miliardoj da planedoj kun simpla vivo en la Lakta Vojo. En la lastaj jaroj oni malkovris milojn da eksterplanedoj, pluraj el ili similas al Tero.

Lastatempe okazis pluraj specifaj malkovroj, kiuj ekcitis ne nur la astrobiologian kaj astronoman komunumojn, sed estis vaste raportitaj ankaŭ en popularaj amaskomunikiloj:

- En majo 2016 NASA anoncis la kompletigon de la misio de la spacteleskopo Kepler [16], kiu dum kvin jaroj malkovis ĉ. 5000 planedojn en foraj sunsistemoj.

- La 24an de aŭgusto 2016 estis anoncita la malkovro de Ter-simila planedo en la vivo-zono ĉirkaŭ nia plej apuda stela najbaro, Proksima Kentaŭro [latine: Proxima Centauri]. [13]

- La 22an de februaro 2017 estis anoncita la malkovro de planeda sistemo ĉirkaŭ la eta ruĝa stelo Trappist-1 [17], 39 lumjarojn for de ni, kun sep planedoj similaj al la Tero, tri el ili en la vivo-zono, vidu la ĉapitron 3.

- En 2018 NASA planas sendi la spac-teleskopon TESS [14], la sekvanto de la Kepler-teleskopo, kiu serĉos terecajn planedoj apud ĉ. 200,000 steloj (sunsistemoj) en nia kosma najbareco.

2. Romano kun astrobiologio

En 1998, kiam Amri Wandel estis vizitanta profesoro en la Universitato de Los-Anĝeleso (UCLA), oni petis lin prezenti kurson de astrofiziko kaj astrobiologio anstataŭ loka kolego kiu estis en sabata foresto. Reveninte al sia hejma Universitato de Jerusalemo, Wandel “importis” la kurson kaj ekinstruis ĝin en Jerusalemo. La kurso “Astrofiziko kaj vivo en la Universo”, estis la unua astrobiologia kurso en Israelo, kaj ĝi tuj fariĝis ege populara. En 1999 ĝi havis pli ol 200 studentojn, kaj Wandel daŭre instruas ĝin en la Universitato de Jerusalemo, ĉiujare al 100-200 studentoj. Plurfoje li denove instruis ĝin ankaŭ en UCLA.

Poste Wandel komencis verki popularajn kaj poste ankaŭ sciencajn artikolojn pri astrobiologio. Li fariĝis membro de la scienca komisiono pri astrobiologio en Israelo, kaj poste ankaŭ en la astrobiologia sekcio de la Internacia Astronomia Unio.

En decembro 2016 Wandel prelegis en internacia astrobiologia konferenco en Vietnamio [15], pri sia esploro pri la viveblecoj en la nove trovita planedo Proksima Kentaŭro b, kaj kurioze konatiĝis kun kolego en la astrobiologia instituto en Madrido, kiu estis esperantisto.

En februaro 2017 unu el la plej grandaj televid-kanaloj PEH TB en Ruslando intervjuis profesoron Wandel por dokumenta filmon pri ekstertera vivo, kaj detale priskribis liajn esplorojn. Laŭ oficialaj taksoj ĉirkaŭ 5 milionoj spektis ĝin [11]. La intervjuo en la ruslingva filmo estas videbla en Youtube, <https://youtu.be/rCkBZr6y-g14?t=4472>, kiu dum du monatoj akiris ĉ. 250,000 spektantojn. Estas ankaŭ angla-lingva versio de la intervjuo [12].




3. Tappist-1 - la plej promesanta sistemo de ter-similaj planedoj kun ebleco de vivo

TRAPPIST-1 estas planeda sistemo [17], je 39 lumjaroj for de nia sunsistemo, en la konstelacio Akvario. Ĉirkaŭ malgranda ruĝa suno, kies grandeco estas ĉ. deko de nia suno, (nur 13oble pli granda ol la Tero), orbitas almenaŭ sep planedoj. La komenca malkovro estis farita de la teleskopoj TRAPPIST, angle TRANSiting Planet and Planetesimals Small Telescope. Kromaj planedoj estis poste identigitaj uzante TRAPPIST, la Spacan Teleskopon Spitzer kaj aliajn teleskopojn.

La planedoj en la sistemo TRAPPIST-1 transitas sian sunon, kio signifas, ke ili pasas inter ni kaj la suno Trappist-1. La planedoj estis malkovritaj danke al la regula kaj ripetiĝanta parta eklipso, alivorte, la ombro, kiun ili ĵetis dum la transito. Mezurante tiujn transitajn, la astronomoj povis kalkuli la orbitan periodon kaj la grandecon de ĉiuj planedoj, kaj la distancojn de la planedoj de la suno Trappist-1.

Oni trovis, ke la planedoj havas grandecojn kaj masojn kompareblajn al tiuj de Tero. Ĉar ni scias la distancon de la planedoj de ilia stelo kaj la temperaturon de la stelo, ni povas dedukti ke ili ricevas kvanton da lumo, similan al tiu ricevita de Tero, Venuso aŭ Marso. Tio, depende de ilia atmosfero, povus ebligi ekziston de likva akvo sur iliaj surfacoj. Kiel ni scias de nia sperto sur Tero, akvo estas baza kondiĉo por vivo.

La sistemo TRAPPIST-1 kompare kun nia sunsistemo



Ĝi estas demonstra versio de la 66-paĝa junia *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono por 2017 kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>



Antoni Grabowski
(1857–1921)

En ĉiu monato estas pluraj esperantistaj jubileoj kaj datrevenoj, okaze de kiuj oni povas prelegi en klubkuveno aŭ renkontiĝo, verki artikolon aŭ blogi en retejo. Ekzemple, en junio temas pri datrevenoj de la meritplenaj forpasintaj esperantistoj Antoni Grabowski, Tibor Újlaky-Nagy, Albert Goodheir kaj Sándor Szathmári.

Ni uzas la okazon por sendi naskiĝtagajn gratulojn al niaj “rond-dataj” juniaj naskiĝintoj: Vinko Ošlak (70 jaroj), Lidia Ligeza (75) kaj Vytautas Šilas (80).
Sanon kaj energion!

Jubileoj kaj memordatoj en junio 2017

6. Antaŭ 40 jaroj mortis **Tibor Újlaky-Nagy** (1915-1977), hungara militisto kaj inĝeniero pri hidraŭliko; kunlaboranto kaj redaktano de *Hungara Vivo* ekde ties fondo (1961), aŭtoro de *La sporta lingvo en Esperanto* (1972), kiu ĝis nun restas la ĉefa terminologia vortaro pri sporto en Esperanto.

11. Antaŭ 160 jaroj naskiĝis **Antoni Grabowski** (1857-1921), pola kemiisto kaj esperantisto (de 1887), nomita “patro de la Esperanta poezio” pro siaj poeziaj tradukoj kaj nemultaj, sed alte taksataj, originalaj poemoj. Ĉefaj tradukoj: *La neĝa blovado* (Puŝkin, 1888), *La gefratoj* (Goeto, 1889), *Nova Antologio* (1909), *Mazepa* (Ŝłowacki, 1912), *El parnaso de popoloj* (1913), *Pekoj de infaneco* (Prus, 1913), *Sinjoro Tadeo* (Mickiewicz, 1918).

15. Antaŭ 75 jaroj naskiĝis **Lidia Ligeża** (1942-), pola filologino kaj esperantistino; aŭtorino de kvar originalaj (*Aleo aŭtuna*, 1987; *Mia eno*, 1996; *Limerikoj*, 1999; *Epizodoj*, 2012) kaj kelkaj tradukitaj poemaroj, interalie, *La Roma triptiko* de Johano Paŭlo la Dua (2006) kaj *La balo en opero* de Julian Tuwim (2013).


19. Antaŭ 120 jaroj naskiĝis **Sándor Szathmári** (1897-1974), hungara inĝeniero, verkisto kaj esperantisto; aŭtoro de originalaj prozaĵoj en Esperanto, inter kiuj elstaras la utopieca romano *Vojaĝo al Kazohinio* (1958), pri kiu Kálmán Kalocsay skribis: «La libro estas insida. Formetinte ĝin, vi ne liberiĝos de ĝi; vi sentos, ke ĝi lasis en vi hoketojn de problemoj».

24. Antaŭ 70 jaroj naskiĝis **Vinko Ošlak** (1947-), slovena verkisto kaj tradukisto; tradukinto de pluraj verkoj en Esperanton (interalie, de la antologio *Sunflanke de Alpoj*, 1992), aŭtoro de la Esperantaj libroj *La dia patrino parolas en Medjugorje* (1986), *Jen la sablo el mia klepsidro* (1991), *Ŝakludantoj* (1997), *La malbabela jaro* (1999), *Filozofii subtende* (2000), *Foje eĉ pensi estas ĝuo* (2003).

26. Antaŭ 105 jaroj naskiĝis **Albert Goodheir** (1912–95), nederlanda instruisto, teologo kaj esperantisto longe loĝinta en Britio; sekretario de la Akademio de Esperanto (1979-82), dum 20 jaroj redaktoro de *Esperanto en Skotlando* (1975-95). Inter liaj verkoj estas tri originalaj poemaroj; ses nefikciaj libroj originalaj kaj kvar tradukitaj pri temoj religiaj, filozofiaj, kulturaj kaj lingvaj; kaj ok tradukitaj beletraj libroj.

29. Antaŭ 80 jaroj naskiĝis **Vytautas Šilas** (1937-), litova inĝeniero, sociaganto, historiisto kaj esperantisto; aktivulo de la Sovetunia Junulara Esperanto-Movado (SEJM), redaktoro de *Kio, Kie, Kiam* (1973-74) kaj *Kurte* (1976-79), la lasta redaktoro de *Litova Stelo* (2006-10), kantotradukanto, aŭtoro de kelkaj Esperanto-lerniloj, ĝenerala sekretario de Tutmonda Esperantista Ĵurnalista Asocio (2008-).

Kulturo



Nia kultura sekcio ĉi-monate estas dediĉita al la 150-jariĝo de Konstantin Balmont, unu el la kvin “B-poetoj” de la “Arĝenta Epoko” en la rusa literaturo (la aliaj estas Belyj, Blok, Brjusov kaj Bunin). Konatiĝu kun Balmont per la jubilea artikolo de Grigorij Arosev kaj per Esperantaj tradukoj de liaj poemoj.

Konstantin Balmont: aŭskulti la printempon

de Grigorij Arosev

Antaŭ 150 jaroj, la 3an (Gregorie: la 15an) de junio 1867, naskiĝis Konstantin Balmont, unu el plej talentaj kaj famaj reprezentantoj de la tiel nomata “Arĝenta Epoko” de la rusa literaturo. Balmont vivis nekutime longe por lia generacio de poetoj, sed lia forpaso estis tre tipa: dum la milito, ĉirkaŭita de mizero, malsano kaj soleco. Okaze de la jubileo Grigorij Arosev skize rememoras la vivon de Balmont.

Konstantin Balmont (Константин Дмитриевич Бальмонт, Prononcu: Konstantín Balmónt) naskiĝis en la jaro 1867a en profunda rusa provinco. La nekutiman por la rusa popolo familinomon la poeto klarigis tiel, ke “laŭ la familiaj legendoj inter la prauloj troviĝis skotaj kaj skandinavaj maristoj, ja la familinomo Balmon estas sufiĉe ofta en Skotlando”. Lia vilaĝo estis vere eta, kie tamen troviĝis ankaŭ domo de la patro Dmitrij, mezriĉa bienulo, kiu la tutan vivon laboris en lokaj instancoj – jen kiel paciga juĝisto, jen kiel estro de loka prefektejo. Lia patrino Vera ricevis institutan kleron, okupiĝis pri kuracado kaj instruado al kamparanoj. Fojfoje ŝi publikigis siajn amatorajn versaĵojn en la provinca gazetaro. Jam estante grava poeto, Balmont skribis en unu el leteroj: “Inter ĉiuj homoj mia patrino, altklera, saĝa kaj malofta virino, plej profunde influis min en mia poezia vivo. Estis ŝi, kiu unue instruis al mi kompreni belecon de la virina animo”.

Balmont ne finstudis en iu ajn altlernejo: unue li estis por unu jaro eksigita el la jura fakultato de la Moskva Universitato (tio okazis en 1887) pro partopreno en la studentaj protestoj. Rezulte Balmont propravole forlasis la universitaton kaj studentiĝis en jura altlernejo, sed ankaŭ tie restis ne longan tempon.

Laŭ la komuna opinio de pluraj esploristoj Balmont estis la unua reprezentanto de simbolismo, kiu ricevis en Rusio la tutlandan famon. Tamen lia kreado ne estis pure simbolisma, ĝi portis ankaŭ spurojn de dekadenco, impresionismo kaj aliaj. Balmont strebis iĝi unu el kunkreantoj de la nova arto, kaj ĉiuj “ismoj” estis por li nur rimedoj aŭ, uzante la nunan modan vorton, tegmentoj. Kiel dirite, baze oni opinias lin simbolisto, sed la unuajn poeziajn kolektojn oni traktas impresionismaj – en tiuj la poeto celis transdoni fulmrapidajn, svagajn impresojn. Ĝenerale temis pri romantikaj versaĵoj, kiuj kontraŭstarigis ĉielon kaj teron, vokis leganton en iun “foran malproksimon”. Por fakuloj de la rusa poezio menciendas, ke la junaj versaĵoj de

Balmont iom similis tiujn de Aleksej Pleŝĉejev aŭ Semjon Nadson. Balmont mem agnoskis, ke lia kreado komenciĝis per angoro, krepusko kaj premiteco. Iu el tiutempaj kritikistoj diris, ke la humoro de malĝojo, orfeco, senhejmeeco, reginta en la fruaj poemoj de Balmont, estis kvazaŭ respiegulo de la pli fruaj meditoj de la malsana, laca generacio de la rusa “inteligencio”.

Protagonisto de la tiamaj versaĵoj de Balmont estis timida kaj obeema junulo, plenigita de plej bonintencaj kaj moderaj sentoj. Sendube, tio estis multflanke kaŭzita de la privata vivo de Balmont. Lia unua geedziĝo okazis en la relative frua aĝo – de dudek unu jaroj, la interrilatoj de la geedzoj rapide fariĝis malbonaj kaj rezulte Balmont provis suiciidi: li elĵetis sin el la fenestro de la dua etaĝo (laŭ la rusa kalkulsistemo de la tria). La rezulto estis fuŝa: li postvivis, nur rompis la gambon kaj larmis dum la tuta restinta vivo. (Poste Balmont havis tri pliajn edzinojn. La aferoj estis eĉ pli malfacilaj, la poeto ne povis decidi por unu el la du unuaj, kaj rezulte faris eĉ novan suikidoprovon – kun la sama maniero kaj la sama rezulto. Kun la tria edzino li vivis en Parizo post la elmigro. De ĉiuj virinoj Balmont havis infanojn, entute kvar – tri filinojn kaj unu filon.)

Ne sukcesinte karieri kiel juristo, li ekokupiĝis pri tradukado, tiel gajnante la monon (detale pri la tradukoj ni parolu iom poste). Sed la vivo ne drolotis lin: post la studentaj protestoj Balmont daŭre havis problemojn kun la oficialuloj. En 1901 li verkis famiĝintan versaĵon *La eta sultano*, pro kiu oni malpermesis al li vivi en la ĉefaj urboj kaj en la urboj kie troviĝas universitatoj. La versaĵo aludis je Nikolao la Dua kaj estis inspirita de la granda socia konflikto inter la studenta movado kaj policistoj. En la denunca letero oni karakterizis la versaĵon de Balmont “cenzure ne permesita, tre aroga kaj indigniga”.



Valentin Serov: Portreto de la poeto Konstantin Balmont (1905)

Ĝi estas demonstra versio de la 66-paĝa junia *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono por 2017 kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Vivis, vojaĝis, verkis

Vivis, vojaĝis, verkis: Esearo omaĝe al Vasilij Eroŝenko, 1890-1952. Tokio: Komitato por Celebri la 125-jaran Jubileon de Eroŝenko, 2015. 100 p., il.



Prepare al la 125-jara jubileo de la blinda verkisto kaj vojaĝanto, esperantisto Vasilij Eroŝenko en Japanio estis fondita komitato, kiu planis diversajn aktivecojn por vidigi al la vasta publiko lian personecon. Inter la agadoj menciendas ekspozicio por nevidantoj kaj ties subtenantoj, memorkunvenoj kaj prelegoj.

Plia iniciato de la celebra komitato estas ĉi tiu libro, kiel frukto de internacia kunlaborado de esperantista kaj blindul-edukista mondoj. Ĝia titolo estas pruntita el la rusa skribaĵo sur la tomboŝtono de Eroŝenko. La kompilintoj elektis ĉefe verkojn speciale preparitajn por ĉi tiu eldono aŭ apenaŭ konatajn ekster la brajla mondo.

La libro konsistas el tri partoj – la Esperanta kaj la japana, kiujn intermitas parto ekspozicia kun la komenco de la poemo *Homarano* en 46 lingvoj. La tradukojn de *Ekbrulugis mi fajron en kor’/ Estas am’ al homar’, al liber’* kolektis Tatjana Auder-skaja por la 7a Lingva Festivalo en Odeso (2001).

La artikolo de Tatiana Novikova detale prezentas la domon-muzeon de Eroŝenko malfermitan en la vilaĝo Obuĥovka kiel filio de region-esplora muzeo en Starij Oskol en 1990 okaze de la centjara jubileo de Eroŝenko. La muzea direktorino gvidas la legantojn tra la vivperiodoj de Eroŝenko, kiujn ilustras ekspoziciaĵoj lokitaj en kvar temaj salonoj: Infanaĝo; Moskva lernejo por blinduloj kaj eksterlandaj vojaĝoj; Vasilij Eroŝenko – verkisto, instruisto, esperantisto; Reveno al la naskiĝloko. En la domo estas fidele rekonstruita internaĵo de tipa domo de mezriĉa vilaĝano ĉe la jarcent-ŝanĝo de la 19a kaj 20a jarcentoj. Kelkaj mebloj apartenis al la familio Eroŝenko.

Pri Vasilij Eroŝenko kaj Esperanto rakontas Anatolij Masenko, prezidanto de Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj (LIBE). La edukista faceto de Eroŝenko centras en la artikolo de Tanabe Kunio, premiita en la konkurso de LIBE, kiu per biografiaj faktoj ilustras la du instigojn, kiujn la aŭtoro ĉerpis de Eroŝenko: 1. Lia vivkapablo; 2. Lia ideo pri lerneja edukado.

En sia eseo Sasaki Teruhiro elstarigas la rolon de Esperanto por kleriĝado de Eroŝenko, kiel siaspecan “universitaton”. Al la literatura kreado de Eroŝenko estas dediĉitaj eseoj de Shi Chengtai (“La akrvida blindula poeto”) kaj de Aoyama Tooru, kiu prezentas *Rakontojn de Velkinta folio*, kiujn li legis student-aĝe en la 1950aj jaroj.

Julia Patlanj sciigas, kiel kreiĝis kaj funkcias la internacia sciencesplora teamo “Vasilij Eroŝenko kaj lia epoko”, kiun ŝi gvidas, pri cirkonstancoj en kiuj kreiĝis la domo-muzeo kaj pri la jubileaj eventoj. Esploroj en arkivoj ebligis trovi novajn faktojn en la biografio de Eroŝenko mem, estis kompletigita genealogio de la familio.

Ĉiujn menciitajn kontribuaĵojn akompanas japanlingvaj resumoj.

Paskotago estas rakonto de Eroŝenko aperinta en japana brajla gazeto. En ĉi tiu kolekto ĝi aperas japane kaj en la Esperanta traduko de Jokohama Esperanto-Rondo. Vizito je la Pasko 1916 de la Katedralo Sankta Nikolao elvokis memorojn pri la festado de Pasko en la familia rondo, pri kutimoj de vilaĝanoj, pri la morto de lia pli juna frato, kies tombon la parto vizitadis ĉiujare je Pasko.

La esperantan parton finas utilaj kronologiaj notoj pri Eroŝenko.

La japanlingvaj kontribuaĵoj havas Esperantajn resumojn, ili prezentas, ekzemple, rakontojn pri liaj amikoj, fragmentojn el la taglibro de Torii Tokuziro, kiu renkontis Eroŝenko en la Tokia Blindula Lernejo. Alia ero temas ĝuste pri la lernado de Eroŝenko en ĉi tiu ŝtata lernejo. Fine aperas verkolistoj de Eroŝenko kun konciza klarigo en Esperanto.

La esearo grave kontribuas al popularigo de la vivo kaj agado de Vasilij Eroŝenko kiel esperantisto, instruisto, vojaĝanto, verkisto. Lian personecon proksimigas al leganto ankaŭ riĉaj ilustraĵoj, inter kiuj nove trovitaj fotoj. La eldonon kaj distribuadon financis la Bonfara Fonduso Taĉikaŭa de la LIONS-klubo de Nihonbasi (Tokio).

Halina Gorecka

Pri Zamenhof litove

En majo aperis riĉe ilustrita 94-paĝa eseo *Zamenhofas istorinĉje Lietuvoje* (Zamenhof en historia Litovio). Ĉi tiun verkon de la Esperanto-veterano Vytautas Šilas eldonis la Vilna eldonejo *Žemės trauka* kaj Vilna Esperantista Societo (VES). La eldonkvanto estas 112 ekzempleroj (12 ekz. estas la tributo por la ĉefaj litoviaj bibliotekoj). La eldonon pagis la aŭtoro mem.

En la libro estas traktitaj historiaj, kulturaj kaj parencaj ligoj de Lazaro Zamenhof kun historia Litovio, kiun li nomis sia patrujo. Temas pri restadoj de Zamenhof en la naskiĝurbo Bjalistoko, en la servourbo Grodno, ankaŭ en tri lokoj de la nuntempa Litovia ŝtato – Vejsejo, Kaŭno, Vilno. Por pli bona kompreno de Zamenhof estis tuŝita ankaŭ la Varsovia temo.

La unua prezento de la libro okazis en la 10a Seminario de Litoviaj Esperantistoj-Ĵurnalistoj (vd. p. 27). La partoprenantoj varme akceptis ĝin. La dua prezento okazis la 25an de majo en kunveno de VES en la Litova Ĵurnalista Hejmo.

VES

Ĝi estas demonstra versio de la 66-paĝa junia *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono por 2017 kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Mozaiko

En nia nova gastronomia rubriko, dediĉita al tradiciaj manĝaĵoj, jam aperis artikoloj pri la Kenigsbergaj klopsoj (Halina Gorecka en januaro) kaj pri la litovaj cepelinoj (Vytautas Šilas en marto). La serion daŭrigas la Bjalistoka esperantistino Nina Pietuchowska per rakonto pri bigoso, populara ne nur en Pollando, sed ankaŭ en Belarusio, Litovio kaj Ukrainio. Multaj el niaj legantoj scias, ke Nina ne nur rakontas pri bigoso, sed ankaŭ majstre kuiras ĝin.



La pola bigoso

Bigoso (pole: bigos) estas tre populara plado en Pollando. Plej ofte ĝi estas preparata kaj manĝata vintre. Ĝi estas deviga plado ĉe lignofajro dum vintraj sledaj amuzveturoj. Bigoso estas “peza” por la stomako, sed bongusta. Ĝia gusto pliboniĝas, se ĝi estas kelkfoje revarmigita.



Ĉiu dommastrino havas proprajn receptojn por bigoso. Do, la sama plado povas gusti iomete diverse depende de ingrediencoj kaj spicoj, kiujn oni uzas. Kiam mi preparas la pladon, ĉiujn ingrediencojn mi mezuras per miaj okuloj, kaj mia lango donas al mi informojn, kio mankas. Oni povas manĝi bigoson kun pano aŭ kun kuiritaj terpomoj.

Bigoso ne aspektas tiel interese kiel cepelinoj, priskribitaj en la marta *Ondo*, sed ĝiaodoro, gusto... Mi esperas, ke bigoso laŭ mia recepto bongustos por vi.

Ingrediencoj

1 kg da acidbrasiko; 0,5 kg da freŝa blanka brasiko tranĉita vermiĉele; 1 karo-
to tranĉita je kubetoj; 1 cepo tranĉita je kubetoj; 300 g da porka viando sen osto
tranĉita je pecetoj; 300 g da fumigita kolbaso tranĉita je pecetoj; 200 g da kruda
fumigita ventrolardo tranĉita je kubetoj; 10 sekigitaj/fumigitaj prunoj; 50 g da tomata
pureo; 125 ml da ruga vino; 3-5 sekigitaj fungoj (boletoj aŭ brunaj kserokomoj aŭ
suiloj); salo; muelita pipro; sukero; dolĉa papriko (laŭ gusto); 2-3 laŭraj folioj, 5-6
juniperaj grajnoj; 5–6 grajnoj da pimento.

Preparado

1. Lavu en akvo acidbrasikon, se ĝi estas tre acida – lavu ĝin kelkfoje.
2. Kuiru ambaŭ brasikojn en apartaj potoj en malgranda kvanto da akvo. Se ĝi elvaporigis, aldonu po iomete plian akvon.
3. En pato fritu ventrolardon. Kiam la fritladeroj estos helbrunaj, forprenu ilin kaj fritu de ĉiuj flankoj viandon. Sekve forprenu la viandon kaj fritu cepon ĝis “ora” koloro. Se ventrolardo estos ne tro graso aldonu 3-4 kulerojn da kolza/sunflora oleo.
4. La fritladerojn, viandon, cepon kun postfrita graso, karoton, fungojn kaj prunojn aldonu en poton, kie kuirigis freŝa brasiko.
5. Kiam brasikoj estos molaj miksu ilin en pli granda poto, aldonu kolbason, spicojn, tomatan pureon kaj vinon.
6. Kuiru dum ĉirkaŭ 10 minutoj, kelkfoje miksante, por ke ĝi ne karboniĝu.

Bonan apetiton!

Nina Pietuchowska

Se en via lando estas peranto de *La Ondo de Esperanto*, pagu al tiu en via landa valuto. Ni havas perantojn en pluraj landoj. Vidu la liston de la perantoj ĉi-sube.

Se vi havas konton ĉe UEA, sendu ĝirilon por 15 eŭroj al la Centra Oficejo de UEA (Roterdamo), kopie al nia redakcia adreso rete (sezonoj@kanet.ru) aŭ poŝte (RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205, Ruslando – Россия). Nia UEA-konto “avko-u”.

Vi povas uzi la internacian monpagan sistemon PayPal, vidu pli en <http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Ruslandanoj pagu 750 rublojn al Галина Романовна Горецкая poŝte (RU-236039, Калининград, аб. ящик 1205), banke (petu informojn pri la kontonumero). Ni akceptas pagojn ankaŭ per Яндекс.Деньги (konto 4100138523456, informu retpoŝte pri la pagonumero), vidu pli en <http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>.

Perantoj de *La Ondo de Esperanto*

Argentino: Roberto Sartor, Saenz Peña 3912, B° La Capilla — 52, CP 5507 — Vistalba, Luján de Cuyo Mendoza. Rete: rosar@fibertel.com.ar.

Aŭstralio: Libroservo de AEA, Esperanto-domo, 143 Lawson St., Redfern N.S.W. 2016. Rete: libroservo@ans.com.au.

Aŭstrio: Leopold Patek, Martinstr. 104/38, AT-3400 Klosterneuburg. Rete: aon.913548977@aon.at.

Belgio: Flandra Esperanto-Ligo, Lange Beeldekensstraat 169, BE-2060 Antwerpen. Rete: retbutiko@fel.esperanto.be.

Brazilo: Brazila Esperanto-Ligo, SDS Ed. Venâncio III Sala 303, BR-70393-902 Brasília-DF. Rete: bel@esperanto.org.br.

Britio: EAB/Viv O'Dunne, Esperanto House, Station Road, Barlaston, Stoke-on-Trent ST12 9DE. Rete: eab@esperanto.org.uk

Bulgario: Georgi Mihalkov, «Nadejda» V, bl. 529, vh A et 9 ap 33, BG-1229 Sofia. Rete: modest@abv.bg.

Ĉeĥio: Pavel Polnický, Na Vinici 110/10, CZ-290 01 Poděbrady. Rete: Cea.polnicky@quick.cz.

Ĉinio: Trezoro Huang Yinbao, Esperanto-Centro, Jinqiao Touzi Gongsi, Jingchuan-Xian Nonglin-lu, Pingliang Gansu, CN-744300. Rete: agrikulturo@126.com.

Danlando: Arne Casper, Bryggervangen 70, 4, tv. DK-2100 København Ø. Rete: arne-casper@email.dk.

Estonio: Ahto Siimson, Kastani väikekoht 12-11, Paikuse, Pärnu maakond, EE-86602. Rete: ahto.siimson@esperanto.ee.

Finnlando: EAF / Päivi Saarinen, Siltasaarekatu 15 C 65, FI-00530, Helsinki. Rete: paivi.saarinen@iki.fi.

Francio: Espéranto-France, 4 bis rue de la Cerisaie, FR-75004 Paris. Rete: info@esperanto-france.org.

Germanio: Wolfgang Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Strasse 9, DE-55129 Mainz. Rete: swanzer@esperanto-buchversand.de.

Hispanio: Pedro A. Garrote, C/Las Mercedes, 5-5°-C ES-47006 Valladolid. Rete: hisperanto.uea@terra.com.

Hungario: Esperanto-Centro Eventoj, Leiningen u. 4, HU-1193 Budapest. Rete: szilvasi@eszperanto.hu.

Hungario: Hungaria Esperanto-Asocio, HU-1146 Budapest, Thököly út 58-60. Rete: hungario@gmail.com.

Irlando: Joy Davies, 9 Templeogue Wood, Dublin 6W. Rete: noviresp@eircom.net.

Islando: Islanda Esperanto-Asocio, p. k. 1081, IS-121 Reykjavík. Rete: esperant@ismennt.is.

Italio: Itala Esperanto-Federacio, Via Villoresi 38, IT-20143 Milano. Rete: f-esp-it@libero.it.

Japanio: Japania Esperanto-Instituto, Sinzyuku-ku Waseda-mati 12-3, Tōkyō-to 162-0042. Rete: esperanto@jei.or.jp.

Katalunio: Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat 1008 E-08204 Sabadell, Katalunio. Rete: v.sole@esperanto.cat.

Koreio: KEA, 1601 Kang Byeon Hanshin Core, 350 Mapo-dong, Mapo-ku, Seoul-121-703. Rete: kea@esperanto.or.kr.

Kroatio: Marija Belošević, Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb. Rete: mbelosev@public.carnet.hr.

Latvio: Margarita Želve, Rūpniecības 35-13, LV-1045 Rīga. Rete: margarita.zelve@gmail.com.

Litovio: Litova Esperanto-Asocio, p. k 167, LT-3000 Kaunas-C. Rete: litova.ea@mail.lt.

Meksiko: Mallely y/o Magdalena Martínez Mateos Av. 523, No.187, 1a Sección de San Juan de Aragón, Del. Gustavo A. Madero, México D.F., CP 07969, México. Rete: ondo@esperanto-mexico.org.

Nederlando: Univerala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam. Rete: ionel@co.uea.org.

Norvegio: Anne Karin Bondhus, Morenefarete 8 A, NO-4340 Bryne. Rete: akbondhus@jkn.no.

Nov-Zelando: G. David Dewar, PO Box 35849, Browns Bay, Auckland NZ-0753. Rete: gddewar@ihug.co.nz.

Pollando: Pola Esperanto-Asocio, ul. Andersa 37/59a, PL-00-159 Warszawa. Rete: sekretario@esperanto.pl.

Ruslando: Галина Романовна Горещкая, 236039, Калининград, аб. ящик 1205. Rete: sezonoj@kanet.ru.

Serbio: Miomirka Kovačević, Španskih boraca 32, RS-11070 Novi Beograd. Rete: miomirka.kovacevic@gmail.com.

Slovakio: Stano Marček, Zvolenská 15, SK-03601 Martin. Rete: revuo@stonline.sk.

Svedio: Leif Holmlund, Kågevägen 40 B, SE-931 38 Skellefteå. Rete: leif.holmlund@telia.com.

Svislando: Christoph Scheidegger, Im Schleedorn 6, CH-4224 Nenzlingen. Rete: ch_scheidegger@bluewin.ch.

Usono: Esperanto-Ligo por Norda Ameriko, P.O.Box 1129, El Cerrito CA 94530. Rete: elna@esperanto-usa.org.

Neniam sendu monon en kovertoj!



BANSKÁ ŠTIAVNICA (SK)

15 - 23 julio 2017

Venu sperti la plej mojosan someran Esperanto-lernejon!

Somera Esperanto-Studado (SES) estas semajna somera internacia lernejo de Esperanto por kaj komencantoj kaj progresintoj kun riĉa distra programo.

► Por informoj kaj aliĝo vizitu:

<http://ses.ikso.net>

